



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINIO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

SONETO

EL LOPE FÉLIX DE VEGA CARPIO

(1562-1635)

Sur blanka mam' de bela Leonoro
Sen tim' ekpikis jen atom' vivanta,
Surhaŭta makulet' kaŝemordanta,
Grenat' ĉe perloj kaj akar' ĉe floro.

Si tuj banetis pro malplaĉ' el koro
Siajn du pintojn el ebur' brilanta
Kaj per detru' de l'pulo vivaganta
Duoble venĝas ŝia punrigoro.

Ekmortante la pul' "Ho, ve!" protestis,
"Por kulp" sengrava, kia puna forto!"
Kaj mi diris: "Feliĉa ja vi estis,

Ne mortu, petu ŝin, je mia vorto,
Ke mi ŝin pikis, kie vi ĵus restis,
Kaj mi ŝanĝos kun vi vivon por morto".

El hispana lingvo tradukis,
VICENTE INGLADA.

SONETO

(EL LOPE DE VEGA)

Sur blanka mam' de bela Leonoro
Iu pikis sen tim' atom' vivanta.
Ĝi ŝajnis haŭtmakul' kaŝe mordanta
Grenat' ĉe perloj kaj akar' ĉe floro.

Si tuj banetis pro malplaĉ' el koro
Siajn du pintojn el ebur' brilanta
Kaj per detru' de ĝia viv' tremanta
Duoble venĝis sin ŝia rigoro.

"Ho, ve—mortante la pulet' protestis—
"Por kulp' sengrava, kia puna forto!"
Aldiris mi: "Feliĉa vi ja estis!

Ne mortu: petu ŝin, je mia vorto,
Ke mi ŝin pikis, kie vi ĵus restis,
Ke mi ŝanĝos kun vi vivon por morto".

El hispana lingvo tradukis,
VICENTE INGLADA.

LA SIMIA MANO

(Daŭrigo)

III

En la granda kaj nova tombejo du mejlojn
malproksima la gepatroj enterigis sian mortinton,
kaj revenis hejmen, kie nur ombro kaj silento
regis.

Cio okazis tiel rapide, ke ili en la unuaj tagoj
preskaŭ ne kredis ĝin kaj restis, kiel personoj
atendantaj, ke io alia estas okazonta; io alia, kio
malprezigos ilian ŝarĝon tro grandan por maljunaj
koroj.

Sed la tagoj forpasis kaj la atendado fariĝis
rezignacio; la senespera rezignacio de la maljune-
co, malprave foje nomata apatio. Okaze ili ŝanĝis
iun vorton, ĉar nun ili havis nenion por diri kaj la
tagoj fariĝis longaj kaj tedaj.

Post unu semajno proksimume de tio ĉi ian
nokton la maljunulo vekigis subite, etendis sian
manon kaj sin trovis sola. La ĉambro estis sen-
luma kaj brueto de mallaŭta ploro venis de la
fenestro. Li sidigis sur la lito kaj aŭskultis.

"Venu tien ĉi", li diris ameme. "Vi malvar-
miĝos".

"Pli malvarma estas mia filo", diris la malju-
nolino, kaj ŝi ekploris ree.

La brueto de ŝiaj ĝemoj nuligis iom post iom en
liaj oreloj. La lito estis varma kaj liaj palpebroj
pezaj pro dormemo. Li fine dormiĝis kaj restis
tiel ĝis kiam subita kaj akra krio de lia edzino
vekis lin ektimigitan.

"La mano!" ŝi kriis freneze. "La simia mano!"

Li ekalarmiĝis. "Kie? Kie ĝi estas? Kio oka-
zas?"

Si iris al li tra la ĉambro ektuŝegante la me-
blojn. "Mi bezonas ĝin", ŝi diris mallaŭte. "Ĉu
vi ĝin ne detruis?"

Ĝi estas en la salono, sur breto", li respondis
mire. Kial via demando?"

Si ekploris kaj ridis samtempe kaj kliniĝinte
kisis lian vagon.

"Mi ĵus tion pensis", ŝi diris histerie. "Kial mi
ne pensis ĝin antaŭe? Kial vi ne pensis pri tio?"

“Pensi pri kio?”, li demandis.

“La alia du dezirojn”, ŝi respondis rapide. “Ni nur petis por unu”.

“Ĉu tio ne sufiĉis?”, li demandis furioze.

“Ne”, ŝi ekdiris triumfe; “ni petos unu pluan. Malsupreniru kaj alportu ĝin rapide, kaj petu, ke nia filo reviviĝu”.

La viro sidigis sur la lito kaj forigis la litotukojn de siaj tremantaj membroj. “Bona Dio, vi estas freneza!”, li diris terurite.

“Alportu ĝin”, ŝi petis sopire; “alportu ĝin rapide, kaj esprimu la deziron... Ho, mia filo, mia filo!”.

Sia edzo bruligis kandelon per alumeto.

“Venu liten”, li diris hezite. “Vi ne konscias, kion vi diras”.

“Ni atingis la unuan deziron”, diris febre la maljunulino; “Kial ne la duan?”.

“Koincidaĵo”, murmuris la maljunulo.

“Iru, alportu ĝin kaj diru la peton”, kriis lia edzino tremante pro ekscito.

La maljunulo turnigis kaj rigardis ŝin, kaj lia voĉo tremis. “Li mortis antaŭ dek tagoj kaj krom tio, kaj mi ne estus al vi rakontonta ĉi tion alie, mi povis rekoni lin nur per liaj vestaĵoj. Se ĝi estis tiam tiel terura vido por vi, kiom multe nun?”.

“Venigu lin ree”, kriis la maljunulino kaj trenis lin al la pordo. “Ĉu vi pensas, ke mi ektimos la filon, kiun mi suĉnutris?”.

Li malsupreniris en mallumo kaj sin direktis al la salono, kaj tie, al la breto.

La talismano estis, kie oni ĝin lasis, kaj terurego pro tio, ke la ankoraŭ ne esprimita deziro povu antaŭ lin aperigi lian kripligitan filon, antaŭ kiam li foriros el la ĉambro, ekregis lin, kaj lia spiro haltis, kiam li ekkonsciis, ke li estis perdinta la direkton al la pordo.

Kun frunto malseka pro malvarma ŝvito li serĉis la vojon ĉirkaŭirante la tablon kaj palpante la muron, ĝis kiam troviĝis en la malgranda koridoro kun la danĝera aĵo en sia mano.

Eĉ la edzina vizaĝo ŝajnis al li aliigita, kiam li eniris la ĉambron. Ŝi estis blanka kaj atendanta, kaj pro sia teruro li pensis, ke io nenatura estis ĉe ŝi. Lia edzino timigis lin.

“Petu!” ŝi kriis per forta voĉo.

“Tio estas malsaĝaĵo kaj malbonaĵo”, li balbutis.

“Petu!”, ripetis lia edzino.

Li levis sian manon. “Mi deziras, ke mia filo vivu refoje”.

La talismano falis planken kaj li rigardis ĝin ti me Poste li enfundiĝis tremante en seĝegon dum la maljunulino kun ardaĵ okuloj iris apud la fenestron kaj levis la sunŝirmilon.

Li sidis, ĝis kiam frostis pro malvarmo, rigardante de tempo al tempo la maljunulinan figuron, kiu observadis trans la fenestron.

La kandelrestaĵo, kiu brulis eĉ sud la rondaĵo de la porcelana kandelingo jetis tramantajn ombrojn sur la plafonon kaj murojn, ĝis kiam kun pli brila ekflamo ĝi stingiĝis.

Kun ne klarigebla trankvilo, la maljunulo pro la talismano malsukceso reiris en la lito kaj unu aŭ du minutojn poste lia edzino venis silente kaj apatie apud lin.

Ambaŭ silentadis, sed kuŝis aŭskultante la tik-

takon de la murhorloĝo. Ŝtupo krakis kaj kriema muso kuris brue en la muro.

La mallumo estis malkuraĝiga kaj post kelke-tempa kuŝado li sin rekuraĝigante prenis la alumetan skatoleton, bruligis unu el ili kaj malsupreniris por serĉi kandelon.

Ĉe la ŝtuparfiniĝo la alumeto elbrulis kaj li haltis por bruligi alian; kaj en la sama momento frapo tiel milda kaj malforta, ke oni preskaŭ ne aŭdis ĝin, sonis ĉe la dompordo.

La alumetoj falis sur la plankon kaj disiĝis en la koridoro. Li staris nemove kaj sen spiro ĝis, kiam la frapo estis ripetata. Tiam li turnigis kaj rapidis en la ĉambron fermante la pordon post li. Tria frapo sonis tra la domo.

“Kio estas tio?” kriis la maljunulino leviĝante.

“Rato”, diris la maljunulo per tremanta voĉo, “rato. Ĝi preterpasis min en la ŝtuparo”.

Lia edzino sidigis sur la lito aŭskultante. Forta frapo resonis tra la domo.

“Tio estas Herbert!” ŝi ekkriis. “Tio estas Herbert!”.

“Ŝi ekkuris al la pordo, sed ŝia edzo sin metis antaŭ ŝin kaj preninte ŝian brakon li forte ŝin haltigis.

“Kion vi estas faronta?”, li murmuris.

“Li estas mia filo; li estas Herbert!” ŝi kriis meha nike baraktante. “Mi forgesis, ke ĝi estas du mejlojn malproksima. Kial vi baras min? Lasu min. Mi nepre bezonas malfermi la pordon.

“Pro amo de Dio ne lasu, ke ĝi eniru”, kriis tremante la maljunulo.

“Vi timas vian propran filon!” ŝi kriis baraktante. “Lasu, ke mi iru. Mi estas alironta, Herbert; mi estas alironta”.

Oni aŭdis alian pordofrapon kaj poste alian. La maljunulino per subita eltiro liberiĝis kaj kuris for el la ĉambro.. Ŝia edzo sekvis ŝin al la ŝtupara ripozejo ŝin vokante petege, dum ŝi rapidis malsupren.

Li aŭdis, ke la ĉeno estis demetata kaj la malsupra riglilo malrapide kaj pene forŝovata. Tiam la voĉo de la maljunulino eksonis kolera kaj duonsufokata.

“La riglilo”, ŝi kriis. “Malsupreniru. Mi ne povas atingi ĝin”.

Sed ŝia edzo estis en la ĉambro serĉante freneze en la mallumo kun siaj manoj kaj genuoj sur la planko la simian manon. Eble li trovos ĝin antaŭ, kiam tio, kio estas ekstere eniru. Pluvo de frapoj resonadis tra la tuta domo, kaj li aŭdis la trenbruon de seĝo, kiun lia edzino metis apud la pordon. Li aŭdis la knaron de la riglilo, kiam ĝi estis iom post iom forŝovata kaj en la sama momento li trovis la simian manon kaj rapidege esprimis sian trian kaj lastan deziron.

Subite ĉesis la frapado, kvankam ĝia eĥo ankoraŭ sonis tra la domo. Li aŭdis, ke la seĝo estis demetata kaj la pordo malfermata. Malvarma vento eniĝis tra la ŝtuparo, kaj longa kaj laŭta plendoĝemo de lia edzino pro seniluziĝo kaj malĝojo liveris al li kuraĝon por kuri malsupren apud ŝin kaj poste al la krada pordo. La proksima stratlanterno per flirtanta lumo vidigis la vojon kvietan kaj senhoma.

INFANAJ ĈAGRENOJ

Sur granda placo bele ornamita per floraj ĝardenoj, ludas infanoj sub la vigla rigardo de la vartistinoj, kiuj samtempe faras trikaĵojn.

Okjara infano, kiun ne akompanas vartistino haltas antaŭ grupon de infanoj, kiuj ludas per belaj ludiloj. Iu el ili, kiun ĉiuj nomas Ferdinando forte ekbatas kartonan ĉevalon.

La infano, kiu iras sola, proksimiĝas al Ferdinando kaj diras:

—Infano, infano! Ne batu la ĉevalon, ĉar vi rompos ĝin.

—Tio ne interesas vin, la ĉevalo estas mia kaj mi povas fari, kion mi volas.

—Se mi havus tiun devalon, anstataŭ rompi ĝin, mi tre amuze ludus.

—Ĉu vi ne havas ĉevalon?

—Ne, mi neniam ĝin atingis posedi.

—Ĉu viaj gepatroj neniam donacis al vi eĉ unu ĉevalon?

—Ne, miaj gepatroj estas tre malriĉaj ne havas monon por aĉeti al mi ludilojn.

—Viaj gepatroj ne amas vin; se ili multe vin amus ili penus havi monon por eĉeti al vi ludilojn, miaj gepatroj ĉiam donacas al mi belajn ludilojn.

—Jes, miaj gepatroj amas min multege, sed...

Subite alta kaj fortika virino portanta sur kapo pakajon de puraj kaj bone lavitaj tolaĵoj haltas apud la infanojn dirante:

—Ludoviko, mia kara ĉu vi ne vidas vian patrinon?

La infano turniĝas, kaj la virino jetante sur la plankon la pakajon, levas Ludovikon per siaj brakoj kaj lin ĉirkaŭpremas apud sian koron kaj kisas karese, poste ŝi reprenas la pakajon kaj ekmarŝas.

Ludoviko reiras apud Ferdinandon dirante:

—Ĉu vi volas, ke ni kune ludu per via ĉevalo? Ferdinando ne respondante, demandas:

—Ĉu tiu virino estas via patrino?

—Jes.

—Kiel malbela ŝi estas, mia patrino estas multe pli bela kaj sin vestas tre elegante; rimarku, jam ŝi venas en nia aŭtomobilo; mia patrino amas min multe pli, ol vin la via, nepre ŝi portos al mi kukaĵojn; sed foriru, ĉar se mia patrino vidas, ke mi parolas kun vi, tial ke vi vestas tiel malriĉe, ŝi min multe admonos, ĉar ŝi ne volas, ke mi parolu kun malbone edukitaj infanoj.

Ludoviko malproksimiĝas iomete ne komprenante la signifon de la lastaj vortoj diritaj de Ferdinando.

De la aŭtomobilo malsupreniras eleganta virino, kies vizaĝo estas tute pentrita. Ferdinando kuras al sia patrino kaj prenas ŝian veston per siaj manetoj, kvazaŭ li atendus ricevi kison; sed la patrino anstataŭ kisi sian fileton forpelas lin dirante:

—Kiel malbona vi estas, Ferdinando, vi rompos mian veston, manĝu trankvile tiujn ĉi kukaĵojn, ĉar mi devas iri en alian lokon tre rapide.

—Jes, mia patrino, mi estos tre bona; sed donu al mi kison.

—Poste mi kisas vin, diras la patrino montrante per ungpentita fingro sian ruĝege pentritan buŝon, nun mi malpurigus vian vizaĝon. Adiaŭ mia kara.

Ferdinando jam ne volis plu ludi, nek manĝis la kukaĵojn kaj unufoje en sia vivo sentis mal-

feliĉon, malgraŭ ke li posedis multajn ludilojn kaj kukaĵojn enviis tiun knabeton, kiu ne posedis ludilojn, sed ĝuas la purajn kaj varmajn kisojn de sia patrino.

PILAR SALVO GONZALEZ.

La legendo pri la kastelo "Malnova Eberstein"

(VIRPORKĜTOMO)

Dum la regado de Otto la Granda ĉirkaŭ la jaro 900 post Kristo, la nobelgento de la grafoj Eberstein, estis unu el la plej riĉaj kaj bravaj. Siajn posedaĵojn ili havis apud la Rejno kaj en "Schwarzwald" (Nigra Arbaro). Ilia serio de praavoj devenis el la protempo, kaj kelkaj legendoj, kies origino oni hodiaŭ ne plu povas konstati, koncerne ilian genton. La granda potenco kaj la kuraĝigo de la fratoj Eberstein, rezultigis, ke troviĝis multaj malkaŝaj kaj kaŝaj malamikoj, kiuj kalumniis la grafojn al la imperiestro. En tiu tempo imperiestro Otto dum multaj jaroj estis en malpaco kontraŭ la kontraŭuloj de la imperio. Ĝuste li sukcesis venki la urbon "Straesburg". Indignanta pro la laŭdira malfideleco de la Eberstein-anoj, la imperiestro tuj igis sieĝi ties kastelon "Malnova Eberstein" en Svabujo kaj mem marŝis kun granda armeo antaŭ la kastelon. Sed la grafoj sciigis pri la kalumnioj, kiujn oni disvastigis pri ili, kaj bone sciis arma sin. Ilia kastelo sur alta roko estis nevenkebla, precipe pro ilia granda militkuraĝo. Kaj post kiam la vana sieĝo de la imperiestra armeo daŭris tri kaj duonan jarojn, oni konsilis al la imperiestro uzi ruzon. La armeo forizis. Mallongan tempon post tio la imperiestro igis proklami grandan turniron, kaj kavaliran feston okazantan en "Speier", kaj ĉiuj batalpovaj kravaliroj estis invititaj al ĝi kun la promeso pri ŝirmateco. Ĉi tio okazis pro la supozo, ke ankaŭ la grafoj Eberstein venos, kiuj estis grandaj amikoj de tiaj aranĝoj. Sed la imperiestro nur intencis forigi ilin el ilia kastelo, por tiam sekrete fulmataki la kastelon kaj fari obeemaj la obstinajn vasalojn, kaj puni ilin. La turniro komenciĝis.

La kavaliroj de Eberstein jam rompis kelkajn lancojn dum la ludo kaj akiris kelkan venkon. Sed la plej juna, la plej forta el la fratoj batalakiris kun gloro la unuan premion, kiun li akceptis el la manoj de la ĉarma imperiestra filino. Aparta distingito estis, ke la posedanto de la ĉefpremio rajtis danci kun la imperiestridino. La danco finu la feston. Kaptita de sekreta amo al la juna grafo, ŝi malkaŝis al li dum la dancado la nekavaliran komploton de ŝia patro kaj avertis lin kaj liajn fratojn, ne resti pli longe en la festo. Tuj kiam la danco estis finita, la juna grafo renkontis siajn fratojn laŭ rimarkeble donita signo, kaj ili interkonsilis kio estu farota. Ili decidis tuj hejmeniri al sia kastelo, sed por trompi ilin, ili ankoraŭfoje reiris al la dancantoj kaj eĉ invitis la kavalirojn al novaj turnirludoj en la venonta tago, por kio ili deponis cent orguldenojn. Sed ankoraŭ sekvis. Jam je la matenkrepusko ili estis hejme kaj faris la preparojn kontraŭ la surprizatako de la imperiestraj soldatoj. Ankoraŭ antaŭ ol la suno tute levigis, la imperiestraj soldatoj almarŝis de ĉiuj flankoj, en gaja venkespero, povi rapi-

de konkeri la kastelon, kiun ili imagis sen estreco. Dume la imperiestro kaj kavalararo vane atendis la komenciĝon de la nova turniro.

La invitintoj ne venis, kaj imperiestro Otto rimarkis, ke li nun estas superruzita de la Ebersteinanoj. Li tuj ekforiris kun siaj soldatoj por rapide helpi la sieĝantojn, sed venante al la kastelo, li tuj vidis la perfektan malvenkon de siaj soldatoj. Oni ĝuste estis trumpetinta por reiro. Centoj de mortintoj kovris la batalkampon. Fine la imperiestro ekkonis, ke li nek per forto nek per ruzo povis atingi ion kontraŭ la bravaj Ebersteinanoj kaj sendis tri el siaj nobeloj por intertraktoj en la kastelon. Ili estis afable ekceptataj, kaj oni montris al ili la amasigitajn provizojn da faruno, greno, fruktoj kaj vino.

La senditoj de la imperiestro multe miris pri la grandegaj provizoj, kiuj ankoraŭ ekzistis post la trijara sieĝo. Ili ja ne sciis, ke sub la greno oni amasigis forjetojn kaj ĉifonaĵojn, kaj la vinbaroj havis duoblajn diskojn aŭ internajn fakojn, kiuj ĉefe entenis akvon. La senditoj reiris al la imperiestra tendaro kaj konsilis al sia estro, rezigni sieĝon, ĉar estas neeble, venki la potencajn Ebersteinanojn.

Tial imperiestro Otto proponis al ili pacon kaj promesis, senti por ili nur amikecon; ĉar de tio li esperis grandajn utilojn. Sed al la plej juna, ankoraŭ ne edziĝinta grafo Eberstein li proponis sian filinon kiel edzinon, por konservi fidelajn al sia dinastio la bravajn Ebersteinanojn ankau per pereneco. Pri la honorplena edziĝpropono, same kiel pri la pacpropono la Ebersteinanoj estis tre ĝojigitaj. Kaj la pompa geedziĝo de grafo Eberstein kun la bela imperiestridino, la sama, kiu avertis lin en tiu turnira vespero, finis la malpacon por ĉiu tempo.

LA HISPANA GRAMATIKO ĈE LA KOMERCO

Diversajn fojojn mi intencis rimarkigi pri la malperfektaĵoj gramatikaj, kiujn oni ofte rimarkas ĉe la hispana komerca lingvaĵo. Mi diris lingvaĵon kaj ne lingvon, ĉar estas du aĵoj tute malsamaj.

Ĉe la komerka lingvaĵo estas tro oftaj la gramatikaj eraroj; tiel oftaj estas tiuj ĉi, ke estas necese mediti por rimarki ilin, ĉar atingis ili familiariĝi tiel, ke estas preskaŭ ne rimarkeblaj.

Unu esprimi tre komerca kaj, laŭ mia opinio, malgramatika, estas "Sumas y siguen" (sumoj kaj sekvas), kiun oni uzas, kiam estas du aŭ pliaj la sumoj, kiuj pasas en la sekvantan folion.

La Komercestoj kutimas diri, ke la mallongeco kiun postulas la praktiko de la komercaj aferoj senkulpigas la gramatikajn malperfektaĵojn; sed je tiu ĉi okazo nek la mallongeco senkulpigas ilin, ĉar ne estas pli longe diri ĝin bone, ol malbone.

Kiam estas nur unu sumo tiu, kiu pasas en la sekvantan folion, oni Kutimas diri Komerce "suma y sigue" "sumas (tiu ĉi folio) kaj sekvas" kaj, laŭ mia opinio, estas bone esprimata, ĉar oni povas esti konsiderataj ambaŭ vortoj, kiel verboj kunigitaj per la konjunkcio "y" "kaj", sed kiam estas du aŭ pliaj la sumoj kaj oni diras "sumas y siguen", "sumoj kaj sekvas", la unua vorto "sumas" nur povas esti konsiderata kiel substantivo kaj tiel rezultas ke restas kunigitaj ĉe la esprime

"sumas y siguen", "sumoj kaj sekvas" substantivo kaj verbo per la konjunkcio "y" "kaj", kio ŝajnas al mi malgramatika.

La ĝusta maniero esprimi tion, kion oni deziras estas, laŭ mia opinio, "sumas que siguen", "sumoj kiuj sekvas", anstataŭante la konjunkcion "y", "kaj" per la relativa pronomo "que", "kiu" aŭ ankau alimaniere "suman y siguen" ili sumas kaj sekvas", tio ĉi estas: konsiderante la unuan vorton ankau kiel verbo kaj uzante ĝin je la tria persono de la multernombro (¿pluralo?).

FERNANDO ETAYO.

A T E N T U

GESAMIDEANOJ: La proksiman tagon 14-an de la venonta monato okazos la lotado je libroj, kiu "Fraterco" organizis favore al siaj anoj. El la premioj pretaj tiucele, oni trovas librojn tiel gravaj kaj interesaj por la esperantistoj, kiel "Originala Verkaro" "La Faraono" kaj aliaj.

Ni dezirus, ke en tiu ĉi disdonado, partoprenus ĉiuj fratecanoj, ĉar por ili kaj por ili oni ĝin aranĝis. Sekve ni invitas ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne aĉetis biletojn, fari tion dum la malmultaj tagoj restantaj.

La lotado okazos ĉe socia Hejmo, antaŭ la Direktanta Komitato, je la oka vespere.

Ni esperas kaj petegas, ke ĝin ĉeestu kiel eble plej granda nombro de fratecanoj.

Esperantistoj,

AKIRU BILETOJN.

S C I I G O J

Nia kara amiko kaj samsocietano Sro. José Lerroux, edziĝis en Cartagena la 12-an de nunjara majo. Ni tutkore gratulas lin kaj al li deziras ĉiuspecajn feliĉaĵojn en lia nova stato.

* * *

Ni ĵus ricevis belan, bone presitan gvidfolion de La Panne, alloga marbanurbo en nordokcidenta Francando, redaktitan en franca, esperanta kaj angla lingvoj. Estas rimarkinde, ke en la esperanta teksto tute mankas supersignoj, kvankam la uzataj vortoj ilin postulas. Malgraŭ tio oni treege bone komprenas ĝin.

P E N S O J

Bautru diradis ke en la drinkejoj oni vendas la frenezon po boteloj.

(Panckoucke).

* * *

Sur la tomboŝtono de mortinta edzino oni trovis tiun ĉi tre signifan skribon: "Miaj larmoj ne redonos ŝin al mi. Jen kial mi ploras".

* * *

Sro. Le Férou, atakata de rabistoj je la kvina horo vespere, diris al ili plej trankvile: "Sinjoroj, vi komencas hodiaŭ en tre frua horo".

* * *

Sro. Elbeuf, sesdektrijara, plendis en la momento de sia morto: "Ho, mi nepre devas morti tiel juna!"